# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

## Internacia Liberpensula Kongreso.

5.–7. de sept. en Berlino.

Estis reprezentataj Anglio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Nederlando, Polio, Portugalio k Svisio. La italoj ne povis sendi delegiton, ĉar Musolini rifuzis al ili pasporton. La liberpensuloj el Usono k Latvio devis kontentigi sin per leteroj.

La granda sukceso de la kongreso estis, ke la ĝisnunaj du internacioj liberpensulaj, la „Internacio de Proletaj Liberpensuloj“ k la „Brusela Internacio Liberpensula“, kunfandiĝis al la „Internacia Liberpensula Unuiĝo“. La malnova statuto de la „Internacio de Proletaj Liberpensuloj“, krom kelkaj malgrandaj teknikaj ŝanĝoj, restis la sama. Do, okazis en Berlin forta antaŭenpuŝo en la liberpensula movado tutmonda.

Jenaj temoj estis pritraktataj:

Problemoj pri junul-edukado (raportis K-do Zimzen [Siemsen], Germ.);

Kolonia politiko de la Eklezio (rap. K-do Bulanĵe [Boulanger], Belgio);

Klerikalismo k faŝismo (rap. K-do Zivers [Sievers], Germ.);

Scienco, tekniko k metafiziko (rap. K-do Hoving, Ned.).

Estas ĝojige, ke oni interkonsentis pri ĉiuj tiaj problemoj. Unuanime oni elektis kiel sekretarion K-don Hartvig k la plenum-komitaton (K-dojn Nilde, Tervanj (Tervagne), Zivers k Ronzal).

Unuanime oni ankaŭ akceptis jenan rezolucion:

„La partoprenantoj de la Liberpensula Mondkongreso, apartenantaj unuflanke al la ‚Fédération internationale des Sociétés de libre pensée‘, aliflanke al la ‚Internationale proletarischer Freidenker‘, unuiĝis por komuna laboro en la ‚Internationale Freidenker Union‘. Unuecaj en la celo la delegitoj povis konstati, ke sur la bazo de la kongresaj priparoladoj inter ili ankaŭ ekzistas laŭprincipa unueco rilate al la metodo.

En tempo, dum kiu la eklezio, – apogante sin sur siaj ampleksaj posedaĵoj k sur sia organiza aparato, akirante pli ol iam senperan influon sur la politika kampo, interligante sin senĝene kun la faŝismo, la plej sanga ilo de la reakcio, fariĝis la ĉefkulpulo de la nuna kultur-reakcio, la liberpensula movado ne povas resti ĉe nuraj sciencaj metodoj, sed devas gvidi la kulturbatalon.

La liberpensula movado ne estas ligita al iu ajn politika partio, sed ĝia gvidprincipo estas la socialismo, ĝia celo estas sociordo, kiu garantias la politikan, ekonomian k spiritan liberiĝon k la progresantan evoluon de l' libera penso. En tiu ĉi senco la liberpensula movado havas la taskon, subteni la socialistajn partiojn.

La internacia liberpensula movado substrekas sian eksterordinaran solidaron kun la socialistaj partioj k sindikatoj en ilia lukto kontraŭ la faŝismo.

Por povi plenumi tiun taskon, necesas iniciati en ĉiuj landoj liberpensulan klasmovadon. Ĝi certe sukcesos, ĉar la ekonomia evoluo k la politikaj spertoj preparas la grundon por la klerigo de l'amasoj. Milionoj da senlaboruloj ekkonas, ke la ‚de dio intencita‘ kapitalista sociordo ne plu estas kapabla nutri siajn proprajn sklavojn. Samtempe la eklezio ankoraŭ ĉiam ricevas sumegojn de la ŝtatoj. – Profitintereso estas la kaŭzo por ekstermado al amasegoj da porvivaĵoj (nutraĵoj, krudmaterialoj ktp.), dum samtempe milionoj da homoj malsatas k suferegas. Konsiderante tion ni demandas: Kie restis la moralaj leĝoj de la eklezio?

Kaj en tiu plej terura k monstra krizo ekonomia, kiu iam ajn regis sur la terglobo, la eklezio konstruas novajn preĝejojn, dum samtempe milionoj da homoj ne scias, kien kuŝigi sian kapon.

En tiu epoko de plej pezaj ekskuoj sociaj estas la devo de ĉiuj progresemaj homoj, envicigi sin en la batalfronto kontraŭ la politika k kultura reakcio“.

Kompiltradukis el „Der Freidenker“ (La Liberpensulo) *Arbarulo.*

## Kristanismo k Socialismo.

Okaze de la 40-jara jubileo de la cirkulero de l'papo Leo la XIII., „Rerum novarum“, la nuna papo Pio la XI. eldonis en majo 1931 „enciklikon pri la socia ordo“. Por montri al la Ge-SAT-anaro la veran karakteron de la katolikismo, kies estro uzurpas ne nur la juĝistan funkcion pri animaferoj, sed ankaŭ pri sociaj k ekonomiaj demandoj, mi citas el la nova encikliko (germ. eldono, paĝoj 10, 11, 35–38) jenon:

„Tio estas la grandioza signifo de la principoj, kiujn proklamis Leo la XIII. per sia supera aŭtoritato, ke ili . . . ne nur iniciatis la kristanajn laboristojn al fondo de multflanka organizo sur profesia bazo (legu: kristanaj sindikatoj! – *Red.*), sed samtempe ankaŭ donis al ili la necesan instrukcion por la efektivigo. Multnombraj laboristoj tiel fariĝis plifortigitaj en sia bona pensmaniero (legu: obeemo, cedemo, toleremo! – *Red.*) k imunaj kontraŭ la logoj de l'socialistaj organizoj, kiuj kuraĝis reklami sin kiel la solajn, kiuj efike pledus por la interesoj de l'ekspluatitoj.“

„Plenrajte oni povas celi, ke iuj posedaĵoj estu publikaj, ĉar ili, kiel grandega potenco en privataj manoj, danĝerigus la publikan bonstaton. Rajtigitaj celadoj tiuspecaj neniel kontraŭas al la kristana ideo. Eĉ multe malpli ili estas speciale socialistaj. Kiu ne celas ion pluan, tiu ne havas kaŭzon esti socialisto.“

„Sendube oni povas observi rimarkindan alproksimiĝon de socialistaj programpostuloj al la postulaĵoj de la kristana socireformo. – Sed neniu kredu, ke ĉiuj nekomunistaj branĉoj de la socialismo, laŭ programo k praktiko, jam adaptiĝis al la ĝusta koncepto. Ĉefe ne temas pri rezigno, sed nur pri iagrada mildigo de l'klasbatalo. – Sed ĉu tia socialismo jam rezignis pri sia kontraŭkristaneco?“

„La socialismo, egale ĉu kiel dogmo, kiel historia fenomeno aŭ kiel movado, ĉiuokaze ĝi ne adaptiĝas al la dogmo de la katolika eklezio – aŭ ĝi cedu esti socialismo: La antagonismo inter socialista k kristana ideologio ne estas forigebla.“

„Kiel ĉiu eraro, la socialismo enhavas ion ĝustan. (Kontraŭ tio ja la papoj neniam protestis.) Tamen ĝi baziĝas sur socikoncepto, kiu kontraŭas la veran kristanan ideon. Religia socialismo, kristana socialismo, estas kontraŭdiroj en si mem. Oni ne povas esti samtempe bona katoliko k vera socialisto.“

Jen, Gek-doj, en sociaj k ekonomiaj demandoj la eklezio estas preta kompromisi, ja – ĝi eble eĉ ne kontraŭstarus la elproprigon de la kapitalistoj. Nur ne tuŝu ĝiajn fundamentajn principojn, aliel vi estas ĝia plej akra kontraŭulo.

Do, socialistoj en ĉiuj landoj, kiom longe ankoraŭ vi hezitas tiri el tio vian konsekvencon?

*Kompiltradukis: Arbarulo.*

## NI ENKETAS.

*Kiaj estas la kondiĉoj rilate la eksiĝon el la eklezio en la diversaj landoj? Liberpensulaj korespondantoj bonvolu sendi pri tiu demando koncizajn raportojn al la redakcia adreso.*

**Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en „S-ulo“ respondecas la aŭtoroj.**